# La biciklo de Mupo

## Rakonto por infanoj

Erik Tantal



# La biciklo de Mupo

## Rakonto por infanoj

Erik Tantal

# Enhavo

La dorsosako....................................................................................4
Ĉe avĉjo..........................................................................................10
Hejme.............................................................................................12
Ekzerci...........................................................................................15
Bicikli estas amuze.......................................................................21
La postveturilo..............................................................................23
La ŝtelo...........................................................................................25
La akcidento..................................................................................31
Strata trafiko..................................................................................35
Biciklaj lecionoj............................................................................38
La ekskurso...................................................................................42
Kelkaj trafiksignoj (en Germanio)..............................................45
La amikoj de Mupo.......................................................................46
Postparolo......................................................................................47
Kolofono........................................................................................48

# La dorsosako

„Ho ve, la dorsosako estas vere peza“, plendas Mupo.

Hodiaŭ li denove estas ĉe avĉjo kaj promesas fari aĉetojn por li. Tiam venas longa listo!


Lakto, pano, fromaĝo, kolbaso, cepoj, terpomoj, karotoj kaj glicirizaĵo. Vere tro multe!



Post la butikumado Mupo elĉerpite eksidas sur la benko por ripozi. Antaŭe estas ankoraŭ longa vojo.

„Rrrrrrrrr“. Kio estas tio?

Riko rapide preterveturas per sia rultabulo. Nur kun granda peno li sukcesas bremsi apud la benko.



„Kion vi faras ĉi tie?“, li demandas kaj sidiĝas apud Mupo.

„Sssssss“. Jam denove stranga brueto.



Ĉifoje estas Aliki kun sia rapida skutilo. Ankaŭ ŝi sidiĝas apud la du amikoj sur la benko.

„Kio okazas ĉi tie? Kio estas en via dika dorsosako? Montru tion al mi!“, demandas ŝi scivoleme.

Mupo volas tuj respondi sed nun venas Kajko sur siaj rulŝuoj. Li miras, ke hodiaŭ tiom da homoj sidas sur la benko. Li interpuŝiĝas por gajni sidlokon apud Riko.


Ĉiuj volas scii, kial Mupo sidas ĉi tie kun dika dorsosako. Ĉiuj volas scii, kio estas en ĝi.

Mupo klarigas ĉion. Li rakontas, ke  avĉjo jam estas tre maljuna. Li ne plu povas bone piediri. Tial Mupo promesis, minimume unufoje en la semajno fari aĉetojn. Kaj, ĉar la dorsosako hodiaŭ tre pezas, li nun devas ripozi sur la benko. Ĉar estas ankoraŭ longa vojo.

„Kial vi ne uzas mian rultabulon? Per tio vi estas pli rapide ĉe avĉjo. Mi ĉi tie atendas vin, ĝis vi reiras“, proponas Riko.


„Jes, sed mia skutilo estas pli bona. Ĝi estas bone stirebla kaj vi atingas avĉjon eĉ pli frue“, anoncas Aliki.

„Stultaĵo“, opinias Kajko, „miaj rulŝuoj, miaj rulŝuoj. Kun tiuj la veturado estas pli bela. Ĉu mi pruntedoni ilin al vi?“



Mupo dankas siajn amikojn. Sed li devas rifuzi la bonajn proponojn:


„Ne, ne. Tiam mi tamen devas porti la dorsosakon. Tio tute ne helpas. Sed mi nun devas foriri. Ĝis revido al ĉiuj!“



# Ĉe avĉjo


"Saluton Mupo. Estas bone, ke vi vizitas min kaj faras por mi la aĉetojn. Nun rizpozu kaj trinku glason da oranĝa suko“, proponas avĉjo.

Li krome ofertas teleron kun memfaritaj bulkoj. Poste li montras al Mupo sian ĝardenon kun la kokinoj.



„Ĉu vi volas kunpreni freŝan ovon? Prenu unu el la stalo, sed fermu la pordon poste!“

La kokinoj laŭte klukas dum Mupo estas en la stalo. Ekscitite ili kuras tien kaj reen. Mupo tre singardeme elektas grandan ovon. Tiu estas tute blanka. Tiam li dankas  avĉjon kiu donas al li novan liston por la aĉetoj en la venonta semajno. Sed tiu slipo ĉifoje ne estas tiom longa.



# Hejme

„Nun mi volas prepari mian tagmanĝon“, diras Mupo la si mem kaj metas tri terpomojn en poton kun akvo. En kaserolo la brunaj fungoj estas frititaj. Kaj kion li faru kun la ovo? Ne, tio aspektas tiel bele. Hodiaŭ li ne planas uzi ĝin. Li metas ĝin sur teleron kaj lokigas tiun sur la fenestrobreton.

Tiam iu subite frapas al la pordo. Estas Bamo, la plej bona amiko de Mupo.

„Ĉu mi rajtas eniri? Ho, tio ja bone odoras. Ĉu vi ĵus finpreparis tagmanĝon? Kaj – kio estas tio?“


Bamo montras al la blanka kokida ovo.

„Tion vi devas ankaŭ friti, ĉu ne? Ĝi certe bongustas.“

Do, Mupo nun devas vole-nevole prepari fritItan ovon por sia gasto.

„Sed vi ricevos nur duonon. La ovon donacis  avĉjo por mi. Ĝi estas tute freŝa.“

Ambaŭ amikoj nun sidiĝas ĉe la tablo kaj post nur malmultaj minutoj ĉio estas formanĝita.



Koran dankon, Mupo. Tio bongustis. Sed duona ovo estas vere tro malmulte por mi. Por la venonta fojo mi mem aĉetos kokidajn ovojn kaj kunprenos kelkajn“, promesas Bamo.

Tiam Mupo rakontas ke la irado kun peza dorsosako estis tiel peniga.

„Al tio mi havas ideon“, diras Bamo. “ Vi povas transporti la dorsosakon per mia biciklo.“


„Dankon por la oferto. Sed mi ja ne scias bicikladon.“

Malĝoje li adiaŭas sian amikon.

# Ekzerci

En la arbaro Bamo renkontas la lertan vulpon Chung kaj demandas lin:

„Ĉu vi scias kiel oni povus instrui al Mupo la bicikladon?




Bedaŭrinde Chung ne havas respondon. Li ja ankaŭ ne povas bicikli. Tial li proponas al Bamo kontakti la saĝan gufon Sekuo.

Sekuo donas al Bamo la konsilon, ke Mupo nur devas teni sian langon rekte dum biciklado. Sed tiu konsilo tute ne funkcias. Kvankam Mupo tenas sian langon rekte, li ĉiam teren falas kun la biciklo.



Tiam venas la ruza korvo Borge. Li konas la solvon:

„Krah, krah. Mupo sidiĝas sur la biciklo kaj de malantaŭe iu devas puŝi kaj firmteni lin. Tiam Mupo ne povas fali. Sed Mupo devas mem pedali kaj stiri.“



Tion volas Bamo elprovi. Eble unue li ricevu bongustaĵon por manĝi? Tiam li pruntedonas al li la biciklon. Mupo ĝojas kaj tuj preparas la tablon. Bamo tuj komencas malplenigi la plenan teleron. Dum tio li laŭte ŝmacas.

La unua ekzerco ne estis sukcesa. Mupo tro forte pedalas kaj Bamo pro sia plenigita ventro ne povas postkuri sufiĉe rapide. Tial Mupo denove falas.

Feliĉe ke venas Bruno, la granda urso. Li firmtenas la biciklon je la malantaŭo. Li puŝas kaj kuras kaj kuras, eĉ kiam Mupo nun pli forte pedalas.



Sed nun venas kurbiĝo. Bruno ne plu povas firmteni la biciklon. Li simple lasas ĝin ruli.

Tion Mupo ne rimarkas. Li nun biciklas sen subteno vokante:

„Ĉu vi vere ankoraŭ firmtenas min, Bruno?“

„Memkompreneble“, grumblas Bruno, sed tio ja ne estas la vero. Tiam Bruno sidiĝas je la vojrando por ripozi. Kaj Mupo biciklas kaj biciklas.

Survoje Aliki kaj Kajko renkonte venas.

„Hura, vi povas ja bicikli!“, vokas ili.

Nur nun rimarkas  Mupo, ke la urso ne plu firmtenas la biciklon.

En timo li stiras tro malproksime al la dekstra flanko kaj falas en arbuston. La amikoj de Mupo laŭte ridas:

„Jes, vi devas ankoraŭ ekzerci malsupreniri!“



Nun la urso trotas al Mupo. Li gratulas lin kaj promesas morgaŭan denovan ekzercon.

## Bicikli estas amuze

Ĉio estas pli facile ol Mupo unue pensis. Bruno nur iomete puŝas lin kaj tiam li rapidegas tute libere. Mupo nun ankaŭ povas bicikli malrapide sen fali. Bruno montris al li kiamaniere ĝuste bremsi. Tiel ankaŭ deseliĝi sukcesas.

Mupo ne scias kion li devas rakonti al avĉjo pri la biciklaj ekzercoj. Ĉiuokaze li nun povas fari pli grandajn aĉetojn. Li simple metus la varojn en la korbon, kiu estas fiksita malantaŭe sur la pakaĵportilo.

Subite diras avĉjo: „Venu kun mi. Ni iras en la grandan stalon.“

Mupo estas scivolema. Kial li devas iri tien? Tie verŝajne estas ja nur fatraso.

Sed avĉjo ridetas kaj montras al nigra biciklo, kiu staras malantaŭe je la muro.

„Kio? Ĉu vi eĉ posedas biciklon?“, Mupo tre miras pri tio.

Li nun ankoraŭ pli multe miras, ĉar avĉjo donacas tiun biciklon al li kune kun ruĝa kasko.



## La postveturilo

„Saluton, Bamo. Mi havas mian propran biciklon. Nun mi povas redoni al vi la vian. Koran dankon!“, anoncas Mupo ridante de ĝojo.


Fiere li metas sian kaskon sur la kapon kaj ekveturas per la propra biciklo. Tiam li veturas antaŭ la domo de Bamo en cirklo kaj eĉ ŝvingas per unu mano. Poste li ekas por fari la aĉetojn. Li bezonas nur malmultajn minutojn por atingi avĉjon. La freŝaj varoj estas en la korbo.

„Domaĝe, ke mi ne povas kunveturi“, plendas avĉjo. „Sed nun vi ja havas la biciklon.“

„Ĉu mi kunportu vin la venontan fojon? Vi povas ja sidi malantaŭe sur la pakaĵportilo“, proponas Mupo. Sed tion avĉjo ne volas.

Reveturante Mupo renkontas sian amikon Bamo kaj rakontas al li ke avĉjo volonte kunveturus. Sed bedaŭrinde tion li ja ne povas.

„Mi havas ideon“, opinias Bamo, „mi donas al vi mian postveturilon. Per tiu vi povas kunporti avĉjon.“



# La ŝtelo

Mupo fiere puŝas la postveturilon en sian ŝedon por la biciklo. Sed tie ne estas sufiĉe da spaco. Do, li devas parki la biciklon antaŭ la pordo. Mupo planas ordigi la ŝedon morgaŭ por havi lokon ankaŭ por la postveturilo. Li ja ne volas ke ĝi malsekiĝu dum pluvo.

En la kuirejo Mupo preparas nun bongustan muslion. Avenflokoj, nuksoj, sekvinberoj kaj raspita pomo. Poste freŝa lakto.  Mupo devas ĝuste maĉi. Tio daŭras. Dum tio li havas sufiĉe da tempo por pripensi.

Kion li volas fari post la matenmanĝo? Estas klare, denove bicikli! Rapide li elĉerpas la teleron per kulero kaj kuras al sia biciklo-ŝedo.

Sed la biciklo estas for!

Ĉu li demetis ĝin apud la postveturilo en la ŝedo? Ne, tie ja ne estis sufiĉe da spaco. Do, kie nun estas la biciklo?

Maltrankvile li kuras tien kaj reen. Li demandas la najbarojn. Sed neniu estas vidinta lian biciklon. Malĝoje li trotas reen.

„Kial vi estas tiel malĝoja“ demandas Fridolino, la malrapida heliko, kiu ĵus antaŭ li rampas je la vojrando.

Mupo raportas, ke la biciklo ne plu estas ĉi tie.

„Mi ne povas helpi ĉar mi estis la tutan tempon en la malseka herbejo kaj vidis nenion. Sed demandu la ruzan korvon Borge. Li ĉirkaŭflugas ja ĉiam super ni kaj havas la plej bonan vidon“, proponas Fridolino..

Tiam jam alflugas Borge.

„Krah, krah, mi tuj flugas super la arbaron. Povas ja esti ke mi vidas la ŝteliston.“

Borge havas tre bonajn okulojn. De supre li vidas suben kaj subite rimarkas la brunan urson Bruno. Kion li portas sur la ŝultro? Estas granda sako, kiun Bruno ĵus volis puŝi en sian kavon.



„Krah, krah. Kion vi havas ĉi tie?“

„Ne estu tiel scivolema!“, respondas la urso, „Tio ne estas via afero!“

Sed Borge restas obstina.

„Mi volas scii, kion vi kaŝis en la sako! Tio certe estas la biciklo de Mupo!“

„Vi certe estas freneza“, grumblas Bruno. „Kial mi kaŝu la biciklon de Mupo en la sako? Ĝi estas ja tro malgranda por mi. Vidu, en la sako estas nur  fojno. Tion mi bezonas por mia nova lito en la kavo.“

Nun Borge vere hontas, ĉar li erare suspektis la urson. Li petas pardonon kaj daŭrigas sian flugon.

Sed kie estas la biciklo de Mupo?

Borge flugas kaj flugas. Malproksime ĉe la monto li vidas bicikliston. Jen la biciklo, li pensas kaj vere. Tie, de kie oni povas bone ruli malsupren, sidas Kajko, la amuza ĉimpanzo. Li sidas sur la biciklo de Mupo kaj rapidegas en la valon.

„Krah, krah. Haltu tuj“, vokas Borge laŭte. „Vi ŝtelis la biciklon de Mupo. Tion vi devas redoni senprokraste!“

„Kial? Kial tio? Mi ĝin trovis. Ĝi staris tute sole antaŭ ŝedo. Tial mi pensis ke mi povas uzi ĝin bone.“

„Sed tio ne estas en ordo. Tio estas ŝtelo. Redonu la biciklon senprokraste. Alikaze mi informas sinjoron Hansen, la policiston.

Kajko nun komprenas, ke li faris eraron:

„Konsentite. Mi ja ne sciis, ke la biciklo apartenas al Mupo. Mi tuj iras al li kaj redonas ĝin."

Kajko antaŭen biciklas al sia domo kaj kunprenas la malnovan ĉenon kun pendseruro.

„Saluton, Mupo. Jen via biciklo. La venontan fojon vi devas bone sekurigi ĝin. Tial mi kunprenis ĉenon kun pendseruro al vi.

Nun Mupo estas vere feliĉa kaj ne plu ĉagreniĝas, ke Kajko uzis sian biciklon.

# La akcidento

„Venu kun mi, Mupo! Ni faru vetkuradon“, vokas Bamo.

„Kiam? Kie? Kaj kiu partoprenas?“

„Nu ja, nur ni ambaŭ. Gravas ke tiam vi estas mia kontraŭulo. Kaj kompreneble estas klare ke mi gajnos. Ĉar vi estas ja nur komencanto!“, rikanas Bamo.

„Tio estas malbona! Sed lasu nin atendi. Kiam kaj kie komenciĝas la konkurso?“

„Nu, ja, tuj. Saltu sur vian selon kaj tiam ni unue biciklos malrapide preter la herbejo ĝis la arbaro. Tie estas bela migra vojo kiu gvidas al la heliko-monto.“

„Ho jes, tiun mi konas. De tie ni povas bone ruli malsupren. Kaj poste ni reveturu.“

„Ekzakte. Ni staros ĉe la rando de la arbaro, veturos sur la heliko-monton kaj tiam reen al la rando de la arbaro kie ni startis. Ni demandu la vulpon Chung ĉu li mezurus la tempon.“

„Kaj kion ricevos la gajnanto?“,demandas Mupo.

„Tiu kompreneble estos mi. Kaj vi devas kuiri nudelojn kun fromaĝosaŭco, ha, ha, ha“, fanfaronas Bamo.

„Konsentite, sed se vi perdas, mi ricevos bongustan glaciaĵon kun  juglandoj de vi. Ĉio estas klara, mi prenas mian biciklon. Ni startu post unu horo.“

Borge, la korvo sidis la tutan tempon je la fenestro. Li rimarkis ĉion kaj tiam forflugas raportante al ĉiuj amikoj, ke ĵus komenciĝos vetkuradon. Chung, la vulpo estas preta por esti la juĝisto. Li kunprenas du klikhorloĝojn kaj vokas:

„En viaj start-lokoj, prete, ek“

Nun okazas la starto. Mupo estas unue eĉ pli rapida ol Bamo. Sed post kelkaj minutoj Bamo preterpasas lin.

Riko kaj Kajko staras je la vojrando vokante: „Muupoo! Muupoo“.

Ili deziras ke Mupo gajnu. Kaj vere. La instigo efikas. Mupo denove atingas la pinton. Li estas eĉ la unua supre sur la heliko-monto.

Nun estas la reveturo suben. Mupo povas indulgi siajn gambojn iomete. Li ja memstare rulas.

Ho ve, tie Bamo denove alproksimiĝas. Mupo pedalas pli, pli forte ne atendante la rompitan branĉon, kiu kuŝas antaŭ li kaj baras la vojon.

Ah! Mupo falas teren. Lia kapo kolizias kun arbotrunko. Tio doloras. Mupo ja forgesis surmeti sian kaskon.

Ĉiuj amikoj rapidas al la akcidenta loko. Feliĉe ke Mupo jam estas sur la kruroj. Li ricevis nur iom da kapturniĝo.

Bamo trankviligas lin: „Ne gravas, Mupo. Hodiaŭ estis sendecida konkurso. La venontan fojon ni veturos nur kun kasko.“

## Strata trafiko

Mupo nun ekzercas nur kun kasko kaj kun la postveturilo sen avĉjo. Tio ne estas facile speciale en la kurbiĝoj. Sed eĉ pli malfacile estas sur la strato en trafiko. Ĉiufoje li ektimas, kiam rapida aŭto preterpasas. Timeme li ĉiam klopodas veturi kiel eble plej dekstre. Kelkfoje la postveturilo eĉ tuŝas la randon de la trotuaro.


Plej aĉe estas, kiam li devas halti antaŭ ruĝa semaforo. Tiam li preferas deseliĝi antaŭen kaj puŝi la biciklon trans la zebrostrioj.

Ankaŭ sur biciklovojo ne ĉiam estas facile. Kelkfoje aliaj biciklistoj venas renkonte kaj li devas stiri flanken.

Tial dum la venonta semajno li volas nur veturi sen postveturilo.

Posttagmeze li renkontiĝas kun Bamo kaj ambaŭ komforte veturas tra la parko. Tie ne estas aŭtoj.

Sed, ho, hororo! Antaŭ la biciklo de Mupo subite aperas granda hundo. Ĝi tre dense alproksimiĝas. La sonorilo laŭte tintas. Sed la hundo ne iras for.



„Ne timu. Ĝi ne mordas vin. Ĝi nur volas ludi!“, vokas la posedantino de la hundo de malantaŭe.

Mupo preferas halti. La hundo iomete atendas iomete pli malproksime.

Nun Mupo havas bonan ideon. Li kaptas bastonon, ĵetas gin malproksimen. La hundo tuj postkuras.

Tial Mupo povas denove sidiĝi sur la biciklo kaj rapide forveturas kun Bamo. La virino intertempe vokis sian hundon kaj metas ĝin al ŝnuro.

Bamo kaj Mupo hejmveturas. Bamo vokas:

„Ne forgesu. Morgaŭ ni renkontos je la sportejo. Tie la policisto ofertas instruadon por biciklado.“

# Biciklaj lecionoj

La trafika policisto s-ro Hansen salutas la infanojn. Inter ili estas Mupo, Bamo kaj du aliaj junuloj. Tiam li kontrolas la biciklojn.

„Jes, viaj bicikloj estas en ordo. Grave estas ke la bremsoj bone funkcias. Vi povas tuj komenci!“

Mupo la unua ekiris. Unue li devas preterpasi mallarĝan vojon. Li ne rajtas forlasi la spuron, sed samtempe li devas retrorigardi. Sinjoro Hansen staras ĉe la fino kaj tenas tri malsamajn tabulojn kun ciferoj sur ili, unu post la alia. Tiujn numerojn devas Mupo rememori kaj je la fino raporti al la policisto.

En la sekva ekzerco staras tablo kun kelkaj buntaj pilkoj apud la vojo.

Mupo devas kapti unu de tiuj pilkoj dum veturado. Je la fino de la vojo li devas ĵeti ĝin en sitelon.

Ho ve, tio ne estis tiel facile!

Sed venas taskoj pli malfacilaj. En la mezo de la sekva vojo staras unu post la alia tri pintaj konusoj kun ruĝaj kaj blankaj strioj. Mupo devas ĉirkaŭveturi sen renversi ilin.

Ho, ve, unu de tiu konusoj renversiĝas kaj Mupo devas ripeti la ekzercon.

La sekva vojo havas formon kiel la cifero ok. Ĉi tie la linioj je la rando ne devas esti tuŝitaj.

Nun temas pri veturado laŭeble malrapida.

Mupo kaj Bamo startas je apudaj vojoj. Kiu atingas la celon kiel la lasta? Kompreneble estas Bamo. Li havas ja pli da sperto!


La lasta vojo estas tre larĝa, por la rapida veturado. Sed ĉiu devas ĝustatempe bremsi por ne tuŝi la linion je la fino.

„Ĉiuj aŭskultu nun!“, vokas s-ro Hansen. „Mi devas rakonti al vi ankoraŭ ion tre gravan.“

Bamo, Mupo kaj la aliaj infanoj forlasas la biciklojn kaj sidiĝas antaŭ la policisto sur benko. Ili atentente aŭskultas.

„Do, infanoj. Unue mi volas gratuli vin. Vi ĉiuj sukcese trapasis ĉiujn ekzercojn. La venontan semajnon vi povas denove veni por daŭrigi la ekzercadon. Hodiaŭ sufiĉas. Sed memoru, ke vi

ĉiam antaŭ la ekveturado devas kontroli bremsojn kaj lampojn. Kaj nun mi havas unu flavan veŝton por ĉiuj el vi. Per tiu vi estas ĉiam bone vidataj per aliaj. Ĉiam veturu je la dekstra flanko de la vojo. Ĉar povas ja esti, ke aperas la aĉaj fantom-biciklistoj!“



# La ekskurso

Preskaŭ ĉiuj venis atendante antaŭ la domo de Mupo. Riko, Aliki, Kajko, Bamo. Sekuo kaj Borge scivolemaj sidas sur la latbarilo. Nur Chung kaj Bruno hodiaŭ ne emas veni.

„Kial Mupo ankoraŭ ne estas ĉi tie?“, demandas Aliki.

„Li devas kunpreni avĉjon. Li certe baldaŭ venos“, opinias Bamo.

Kaj jen li estas ĉi tie. Malantaŭe la postveturilo. En tiu sidas avĉjo. Sed antaŭ la starto Mupo devas ankoraŭ anonci ion:


„Promesu, ke vi ne veturas tro rapide. Mi ja devas forte pedali, ĉar avĉjo estas sufiĉe peza.“

„Ne zorgu pri tio. Vi estas la unua kaj veturas je la fronto. Ni ĉiuj sekvas malrapide poste“, trankviligas lin Bamo.

„Krah, krah, sed ni flugas jam antaŭen kaj jam inspektas la vojon“, vokas Borge, kiuj tuj kun Sekuo ekflugas.

Kaj nun ĉiuj ekas. Mupo sur la biciklo kun flago kaj avĉjo en la postveturilo, Riko sur la rultabulo, Aliki kun sia skutilo, Kajko sur rulŝuoj kaj Bamo sur sia biciklo je la fino de la vico.

Li fiksis ankaŭ flagon malantaŭe je la pakaĵportilo. Tiu gaje flirtas en la vento. Lia bicikla sonorilo faras grandan bruon. Tion ankaŭ Mupo aŭdas kaj nun ankaŭ laŭte sonorigas.



# Kelkaj trafiksignoj (en Germanio)

Koloro: RUĜA

DANĜE NKTO




KOMUNA PIED-kaj BICIKLOVOJO

PASEJO POR PIEDIRANTOJ

AUTOVOJO

---

*Ĉe Wikipedia troviĝas kromaj trafikaj signoj:*


https://de.wikipedia.org/wiki/Bildtafel_der_Verkehrszeichen_in_der_Bundesrepublik_Deutschland_seit_2017

# La amikoj de Mupo


Mupo



Aliki




Bamo




Borge




Riko



Kajko




Avĉjo



Chung



Bruno



# Postparolo

Grandan dankon al Kay (Kaysn), kiu desegnis la bildojn kaj Robert por la kontrolo kaj plibonigo de la teksto.

# Kolofono


| | |
|---|---|
| **Titolo** | La biciklo de Mupo |
| **Originala titolo** | Mupos Fahrrad |
| **Aŭtoro** | Erik Tantal alias Klaus Friese |
| **Traduko** | Klaus Friese |
| **Versio** | 1-a eldono, 2024 |
| **Kopirajto** | © Klaus Friese, Hamburg |
| **Retpoŝto** | friese@esperanto-hamburg.de |
| **Desegnoj** | Kaysn (Kay Friese) |
| **Hejmpaĝo** | esperanto-klaus.de |